

Joseph M. Scriven ,  
 Trans imag' Jesu' amikas

*tradukita de Reinhard Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -  
 kia la privilegi',  
 ke li portas nian ŝuldon.  
 Preĝe donu ĝin al li.  
 Kiom ni disipas ŝancojn  
 pri anima harmoni',  
 sole ĉar ni rezignadas  
 preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,  
 tento kaj eĉ tragedi'  
 ni neniam malesperu.  
 Preĝe prenu ĝin al li,  
 la fidela akompano.  
 Amikec' ne eblas pli.  
 Konas li malforton ĉian,  
 preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,  
 kaj senfina la defi'.  
 Ĉion la Savant' superas.  
 Preĝe fuĝu ni al li.  
 Se forturnas sin amikoj,  
 preĝe diru ĝin al li.  
 Vin konsole ĉirkaŭbrakos  
 la Unika sen kopi'.

...

Joseph M. Scriven ,  
 Ho Jesu', amiko mia

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ho Jesu', amiko mia,  
 Kiel alta estas vi!  
 Estas vi peranto nia,  
 Kiu ligas nin kun Di'.  
 Kiom da aflikto devas  
 Nenecese porti ni,  
 Se preĝante, Lin serĉante  
 Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas  
 Nin kun ega energi',  
 Ni ne devas timi ion,  
 Se kredeme preĝas ni.  
 Jen montriĝas la fidelo  
 De Jesu', nin helpas Li,  
 Kiel la Savant' potenca.  
 Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj  
 Kaj nin premas tio ĉi,  
 Certe helpas nin Jesuo,  
 Niajn preĝojn aŭdas Li.  
 Se amikoj vin forlasas,  
 Diru tion nur al Li!  
 Li vin ŝirmos kaj konsolos.  
 Nur al Li vin turnu vi.

...

Vi, Savant', promesis porti  
 ŝarĝojn niajn tie ĉi.  
 Tial ilin ni demetu  
 ĉiujn preĝe nur ĉe vi.  
 Baldaŭ preĝoj ne necesos  
 ĉe la brila tron' de Di'.  
 Ĝis etern' ni restos rave  
 en ador' kaj laŭd' al Li.

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

*Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)*

*Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperanto-Ligo (KELI), en Aŭgusto de 2006.*

Ho Savanto, Vi promesis,  
 Ke Vi portos ja por ni  
 Niajn ŝarĝojn, ni do portu  
 Ĉion preĝe nur al vi.  
 Baldaŭ ni ne devos preĝi  
 Plu sur tiu Tero ĉi,  
 Tie ni senfine gloros  
 Vin en eternec', ho Di'.

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (\*1820 – †1886) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-08-24.*

*MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)*